

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando.

Tiun ĉi jaron komenciĝas la kvara jaro de okupado de Kongolando fare de Unuiĝinta Naciara Forto. La ĉeesto de internacia truparo en tiu afrika lando estas historia fakto senprecedenca, kiu valoras atentan ekzamenon. Kiam konfliktoj okazis inter la katanga ĝendarmaro kaj la UNO-soldatoj, informado abundis. Tio ne signifas, ke ĝi ĉiam diskonigis la veron. Hodiaŭ novaĵoj pri tiu mondparto rariĝas. Estas simptomo, ke la situacio pliboniĝis. Ni jam rimarkigis bedaŭrindan tendencon en nia informado: ni tro reliefigas la akcidentojn, konfliktojn, krizojn kaj tro facile forgesas informi pri la senbruaj venkoj neperfortaj. Tiu sinteno influas nian komprenon de la mondevoluo. Ni tro interesiĝas pri kelkaj detaloj por povi akiri klaran vidon pri tutaj fenomenoj. En Kongolando nun okazas tre grava evolu-procezo, kiu certe forte markos la organizon de la morgaŭa mondo. Ni ne sufiĉe atentis la fakton, ke hodiaŭ Kongolando ludas la rolon de grandega laboratorio, kie eksperimentiĝas grandskale plej diversaj teorioj. Homaranoj ne povas malatenti, kio okazas en tiu afrika lando. Unue ili devas provi kompletigi sian informadon. Poste ili devas provi tiri kelkajn konkludojn, ne nur koncerne la nigran kontinenton, sed precipe koncerne la evoluon de Unuiĝinta Naciaro. Jen programo, kiun ni proponas al vi por kelkaj semajnoj. Dank'al broŝuro eldonita en februaro 1963 de Unuiĝinta Naciaro mem pri la Kongo-operacio mi provos kompletigi kaj korekti nian informadon. Ni poste faros demandojn al ni mem kaj provos trovi konvenajn respondojn. Estos debato al kiu, mi esperas, kelkaj aŭdantoj partoprenos per esprimo de sia vidpunkto.

Neniu ampleksa agado entreprenita de Unuiĝinta Naciaro ŝajne okazigis tiom da eraraj komprenoj aŭ estis akceptita kun tiom da konfuzo de la publika opinio, ol la Operacio ĉe Kongolando. Parta motivo al tiu sinteno de la publiko estas kaŭzata de tio: ke tiu Operacio estas unika ĝis hodiaŭ en la historio de UN, ĉu cele, ĉu signife, ĉu eĉ koste. Diversaj kontraŭaj politikaj sintenoj pligravigis ĝian propran komplikecon. Tamen estas nenio dubo, ke tiuj eraraj komprenoj kaj tiu konfuzo estas grandparte rezulto de la katanga propagando. Tiu bone organizita kaj financigita kampanjo ne hezitis disvastigi falsajn informojn. Dank'al la nuna silento la klimato malpasiĝas. Tio permesas pli da objektiveco.

UN intervenis en la eksbelga kolonio post urĝa alvoko de la Registaro de Kongolando. Estis la 14-a de julio 1960. La lando ĵus sendependiĝis la 30-an de junio kaj jam la armeo ribelis. Tiu armeo nombris 28'000 bone armitajn anojn, kiuj ĝis tiam obeis al belgaj oficiroj. Tiu ribelo minacis la civilan loĝantaron, kaj ĉefe la belgajn naciianojn. Pro tio, kaj tio kontraŭ la volo de la kongolanda registaro belgaj paraŝutistoj estis denove senditaj en la landon. En diversaj provincoj secesio minacis. Estis ĥaosa situacio, kiu minacis la aŭtoritatojn de kompleta disfalo.

La Registaro de Kongolando tiam alvokis la helpon de Usono, sed la prezidanto Eisenhower ĝin konsilis sin turni al Unuiĝinta Naciaro prefere, ol al tia aŭ alia nacio. Tiu konsilo estis observata.

Al la internaj malfacilaĵoj de Kongolando aldoniĝis problemoj ligitaj al plej diversaj formoj de fremda enmiksiĝo kaŭzataj de politikaj aŭ financaj helpoj. Tiu fenomeno ĉefe okazis en la provinco Katango, riĉa je minaĵoj: kupro, kobalto kaj uranio.

En mezjulio 1960 la Konsilio pri Sekureco, antaŭ la danĝero de la situacio en Kongolando por la paco kaj internacia sekureco, respondis favore al la alvoko de la kongolanda registaro. Laŭ la Konsilio povomanko en tiel granda regiono malfermus liberan vojon al la fremda enmiksiĝo, kio riskus provoki tre danĝeran konfrontadon inter ambaŭ grandaj potencoj Usono kaj Sovetio. Konscia pri la politikaj kaj financaj malfacilaĵoj supervenkenda, la Konsilio pri

Sekureco tamen ne povis elekti alian vojon, ol respondi al la alvoko de la kongolanda registaro.

Vastega kaj malsimplega tasko atendis Unuiĝintan Naciaron. Estis necese varbi multnombrajn civilan kaj militan personaron. La UN-Forto nombris pli ol 20'000 oficirojn kaj soldatojn, kiam ĝi atingis sian maksimumon. Tiam proksimume 1300 civiluloj ankaŭ laboris por UN en Kongolando. Tiu civila kaj milita personaro de UN alvenis en Katango kun la plena konsento de s-ro Mozeo Tshombe, ĝia prezidanto, kaj de la aliaj ministroj. Ili tiam akceptis en la flugejo la unuajn elementojn de la UN-soldataro. Estis komence de aŭgusto 1960.

La celoj por la Operacio de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando estas difinitaj en pluraj rezolucioj de la Konsilio pri Sekureco. Jen kelkaj : « *Helpi la Registaron restarigi kaj konservi la nacian unuecon kaj la teritorian integrecon de Kongolando* » aŭ ankoraŭ « *Helpi la Registaron restarigi kaj konservi publikan ordon kaj protekti la personojn kaj bienojn en la tuta lando* ». Alia diras : « *Malebligi civilan ekmliton en la lando kaj helpi la Registaron ĉesigi la tribajn luktojn kaj alporti intertriban pacon* ». Tiu, kiu alportis plej da malfacilaĵoj, estas : « *Defendi la landon kontraŭ la fremda enmiksiĝo en ĝiajn internajn aferojn, tio interalie per elimino de la dungsoldatoj* ». Ni ekzamenos tiun problemon dum venonta prelego. Ĝi kaŭzis konfliktojn en la provinco Katango.

Vi aŭdis prelegon el Svislando pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-